38a KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO
Àger, de la 12a ĝis la 15a de oktobro 2017

# KONGRESLIBRO

## Àger-Montsec, preter la limoj!

ESPERANTO*
CAT
* Associació Catalana d'Esperanto
Kataluna Esperanto-Asocio

UNESCO
Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo

La 100ª mortodatreveno de Ludoviko Zamenhof
Solenata sub la aŭspicio de UNESKO



Karaj gepartoprenantoj,


Unu plian jaron Kataluna Esperanto Asocio havas la plezuron organizi la Katalunan Esperantan Kongreson. Ĉi-jare ni renkontiĝas en Àger kun la temo «Preter la limoj». Ĉi-tie meze de la montaro Montsec troviĝas grava astronomia centro kiu ebligas nin rigardi kaj studi la universan mondon ekster nia kapablo: la steloj.

La vojon celitan de ni, esperantistoj, montras al ni unu stelo. Kiel jam indikis Zamenhof en la verko *La Vojo*, Esperanto «simile al stelo en nokta ĉielo, al ni la direkton ĝi diras». La vojo estas universala kaj neŭtrala lingvo kiu permesas nin interkompreniĝi kun ĉiu homo tra la mondo senkondiĉe de origino, kulturo kaj lingvo, ĉar la esperantistaro volas iri preter la limoj de la lingvaj baroj.

Dum tiu ĉi Kongreso, la buntaj programeroj ne nur pritraktos observadon kaj studadon de la ĉielo kaj ĝia universo. Ĉar esperanto estas universala lingvo vi trovos atelierojn, paroladojn kaj agadojn en esperanto, sed ankaŭ katalune kaj hispane.

Kiel prezidanto de KEA mi deziras, ke vi ĝuu la 38an Katalunan Kongreson de Esperanto.

Josep Franquesa Solé
prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio



Començaré, després de donar-vos la més cordial benvinguda a la Vall d'Àger, per dir-vos que és un plaer, en aquests temps tant convulsos, albergar el 38è Congrés Català d'Esperanto. El tercer congrés que feu en terres de ponent, i el segon en terres de ponent de parla catalana.

L'Esperanto, és un símbol de Pau i Unió entre tots els pobles del Món. A més però, els valors de la vostra associació són més necessaris que mai a casa nostra: els drets lingüístics, la diversitat lingüística i el dret a la comunicació plena entre persones de llengües diferents són part important dels drets fonamentals de les persones, que sembla que a les nostres terres no cal respectar per segons qui.

A més, enguany, és el centenari de la mort del Dr. Zamenhof, creador de l'Esperanto. Ell va morir en mig de la primera guerra mundial, veient com els interessos d'uns pocs s'avantposaven a les vides de les persones. Actualment, a les nostres terres, els interessos d'alguns veïns poderosos es defensen per sobre dels drets fonamentals dels nostres ciutadans. Són temps tristos i al mateix temps plens d'esperança. Perquè tenim l'esperança de ser capaços d'anar més enllà dels límits i esdevenir un Estat en forma de República.

El tema del congrés, que en la seva frase, "Àger-Montsec, Més enllà dels límits" sembla que ho engloba gairebé tot, donarà la oportunitat de parlar de molts temes i fer diverses activitats. Desitjo de tot

cor que aquest pas per casa nostra esdevingui un bon record per a tots els congressistes. Per nosaltres ben segur que ho serà.

Benvinguts i benvingudes a la Vall d'Àger, gaudiu de l'estada entre nosaltres i us esperem en una propera visita.

Lluís Ardiaca i Montardit
alcalde d'Àger

# ÀGER

Àger (pr. [aĵe]) estas vilaĝo kaj komunumo en la komarko (regioneto) Noguera, nord-okcidente de Katalunio, fizike limigita de la riveroj Noguera Pallaresa kaj Noguera Ribagorçana. Ĝia loĝantaro totalis 602 homojn en 2016, kun denseco 3,75 loĝ/km². Ĝia geografia areo estas 160,6 km² kaj alteco 642 m smn. Etimologie la termino Àger aperas en dokumentoj de la 11a jarcento. Verŝajne devenas el la latina vorto *aggere*, kies signifo estas «taluso».

Municipaj entoj (vilaĝetoj): Loĝantaro. Àger: 517; Agulló: 45; Corçà: 32; Fontdepou: 16; els Masos de Millà: 17; Millà: 5; la Règola: 21; Sant Josep de Fontdepou: 19; Vilamajor: 13.

La vilaĝa ekonomio baziĝas ĉefe sur senirigacia agrikulturo kaj brutaro, kvankam dum la lastaj jaroj turismo ekgravis, aparte rilate al la praktiko de aventuraj sportoj (paraglisaj flugoj, balonoj, grimpo...).

La plej alta punkto de la urbo estas okupita de la restaĵoj de la monumentaj kastelo kaj kapitula preĝejo de Sankta Petro. Àger ŝprucis ĉirkaŭ ĉi fortikaĵo konstruita de Arnau Mir de Tost en la 11a jarcento, dum la kristana konkero, sur la ruinoj de antikva romia kastelo. La klostro de la kapitula preĝejo, kie vivis komunumo de kanonoj, estas de la 14a-15a jarcentoj. Estas restaĵoj de romia vojo de la 2a jarcento pK, kaj sarkofago, kiu estas nun en la preĝejo de Sankta Vincento. Aliaj ĉirkaŭaĵaj ermitejoj estas tiu de Sankta Helena, de la 15a jarcento, kaj tiu de la Dipatrino de Pedra, kiu konservas la romanikan preĝejon de la 11a jarcento apud la 17-jarcenta konstruaĵo. Krome, en ĉiu el la vilaĝetoj kiuj formas la komunumon estas aliaj kulturaj interesaj lokoj, kiel la ermitejo de Dipatrino de Pertusa ĉe Corçà, aŭ la preĝejo de la Sankta Triunuo, ĉe La Règola.

La vilaĝo de Àger estis grava karlisma centro dum la militoj kiujn la karlistoj starigis. Dum la Unua Karlisma Milito la urbo havis militan hospitalon kaj karlisman junton.

En Àger estas ankaŭ la Centro por Observado de la Universo, ĉe la Astronomia Parko Montsec.

## MONTSEC

La Montsec-montaro estas grandega ĉifa zono kiu stariĝis, kiam la kontinentaj platoj koliziis milioncentojn da jaroj antaŭe. La loko havas tute malsamajn rokajn formojn al la plejmulto de la aliaj sportflugaj lokoj. Io kiel en okcidenta usona filmo. Multkoloraj rokoj, nadloj kaj montoj estas ĉie, de malhele ruĝa al preskaŭ blanka marmoro. Ĉio formita de sedimentaj tavoloj originintaj en la sekundara epoko, kiuj koincidas kaj intermiksiĝas kun la sedimentoj de la terciara kaj kvaternara epokoj. Ĉi tie estas ideala loko por sciencaj studaj ekskursoj; la nekutimaj rokaj eksterteriĝoj estas vizititaj regule de geologoj de multaj kaj diversaj landoj, pro ĝia escepta eduka valoro. Specialaj punktoj de intereso estas ĉe La Règola, La Baronia kaj la Pedrera (deklivo) de Rúbies.

Ankaŭ de granda intereso estas la loka pejzaĝo, kiu povus esti impone majesta, kiel la kanjono Mont-rebei, aŭ pace izoleca, kiel la malgrandaj valoj ĉirkaŭ Dipatrino de Colobor.

## LA KONGRESEJO: SALONOJ

La Kongresejo konsistas el tri salonoj: la Socia Lokalo kiun la Àger-anoj uzas por ĉiuj lokaj sociaj eventoj, la Juna Lokalo kaj la Etula Lokalo. Ni alnomas tiujn salonojn laŭ jene: Zamenhof, Benet Rossell kaj Manuel de Seabra.
La Kongresejo situas ene de la vilaĝo je 350 metroj de la ŝosea alveneniro, maldekstre, tuj videbla.




**Ludwik Zamenhof** naskiĝis en 1859 en la urbo Bialystok, hodiaŭ en orienta Pollando. Li poste vivis en Varsovio, studis medicinon kaj fariĝis okulisto. En 1887, 27-jara, li evoluigis la bazon de la internacia lingvo kaj danke al la doto de sia bopatro publikigis ĝin. Iom post iom la internacia lingvo disvastiĝis tutmonde. Lia edzino Clara apogis lin tutkore.

Kiel pseŭdonimo li elektis Doktoro Esperanto-n. «Esperanto» signifas «persono kiu havas esperon» en la nova lingvo; lia espero estis la disvastigo de sia lingvo kaj ke ĝi kontribuus al reciproka kompreno kaj al la redukto de konfliktoj inter membroj de malsamaj nacioj.

La *Unua Libro* havis enkondukon, mallongan gramatikon kun nur dek ses bazaj reguloj kaj vortaron; de komence la libro estis publikigita en kvin lingvoj: rusa, pola, franca, germana, kaj poste la angla ankaŭ.

La Universala Esperanto-Asocio aparte memoras la ĉi-jaran mortotagon de Ludwik Zamenhof. Mark Fettes, la prezidanto de UEA, loĝanta en Kanado, substrekas: «Zamenhof estis eksterordinara personeco. Li survojigis novan lingvon kaj tiel metis la bazon por tutmonda lingvokomunumo. Ni memoras lin kun plej granda respekto.» Fakte neniu alia homo en la homa historio sukcesis krei vivantan lingvon, kiu havas multspecan kulturon kaj estas komparebla kun la etnaj kajj ŝtataj lingvoj. En Hungario Esperanto kiel fremdlingvo jam akiris samrajtecon kun aliaj lingvoj.

Pliajn informojn trovu ĉe: www.zamenhof.life



**Benet Rossell** (Àger, 1937-Barcelono, 2016) estis internacia artisto. Desegno, gravuraĵo, signa skribado, spektakloarto, skulptaĵo, filmo, muziko, teatro kaj poezio estis interplektitaj en sia verkaro, kreante personan artan koncepton en kiu la verkoj estas procezo de konstanta reinvento.

Post kompletigi liajn universitatajn studojn pri leĝo (1956), ekonomiko (1958) kaj sociologio (1962), Rossell diplomiĝis pri teatro en 1964 ĉe la Internacia Universitato de Teatro de Parizo, decida travivaĵo kie li unue aŭdis pri «totala teatro», komprenita kiel ago kiu uzas la konceptojn de festado kaj rito en la teatraĵoj. Rosell mem priskribis tiujn travivaĵojn kiel: «...pli proksime al signa reprezentado ol al teksto. Mi venis en kontakton kun lingvaĵoj kies kodo estis al mi tute nekonata, lingvaĵoj sen kodo por mi. Mi trovis ilin fascinaj, kaj ili estis tre eble la origino de la lingvaĵo kiun mi kultivis ĉie tra mia arta trajektorio, kiu venas de diverseco de signoj, ikonoj, mikrografioj, kaligramoj aŭ benigramoj, sen kodo, neripetitaj kaj neripeteblaj, kiuj kunekzistas artikulitaj kaj sin manifestas en maniero kiu ili ĉiam estas unikaj, ĉiam reinventitaj, kaj tio je la fino formas mikro-teatran aŭ kaligrafan reprezentadon de la granda mikro-teatro de la mondo.»

Tie li ankaŭ studis filmarton ĉe la Etnografia Komitato de la Filmo. Estis en Parizo kie li faris la unuan eksperimentan filmverkon. Dume li vojaĝis vaste kaj pasigis longajn periodojn en aliaj landoj, inkluzive de Hindio kaj Nepalo.

En lia plej lastatempa retrospektiva ekspozicio, ĉe MACBA (Barcelona Muzeo de Nuntempa Arto) en 2010, Benet Rossell ne sekvis la gvidliniojn de kronologia retrospektiva uzo, sed proponis selektan montradon de lia verkado, kun aparta atento al du el siaj lingvaĵoj plej karakterizaj: kaligrafio kaj filmo.

Liaj pli ol 60 ekspozicioj, sole aŭ kolektive, daŭris de 1967 ĝis nun, en Barcelono, Parizo, Madrido, Karlsruhe, Nova Yorko, Luxemburgo, Lleida, Balaguer, Àger... En Parizo li estis membro de la arta grupo ekzilita pro la hispana diktaturo, «Katalunoj de Parizo» (tezo de Claudia Arbulú Soto «Los Catalanes de París») per multaj filmoj, inter ili Ceremonials (1974), kiu ĉi-jare (23/06/2017) partoprenis en la arta festivalo Bienalo de Venecio. Lia tuta diverstipa filma produktado enhavas pli ol 30 titolojn.



**Manuel de Seabra** (naskiĝis la 7-an de julio 1932 en Lisbono, Portugalio, mortis la 22-an de majo 2017 en Barcelono) estis profesia verkisto, kiu uzis la portugalan, la katalunan kaj Esperanton kiel literaturajn lingvojn.

Li tradukis multajn verkojn de la monda literaturo ĉefe al la kataluna. Ekde 2000 li prezidis la Associació Col·legial d'Escriptors de Catalunya (Kolegia Asocio de Verkistoj de Katalunio). Kiel membro de Esperanta PEN-Centro kaj de Esperantlingva Verkista Asocio, en 1998 li iniciatis (kune kun Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno), ke jaron post jaro William Auld kandidatu por la Nobel-premio pri literaturo.

Manuel de Seabra faris el Katalunio unu el siaj multaj patrioj, eĉ tiu kun kiu li plej intime identiĝis emocie kaj intelekte. «Oni devas substreki ion, kio estas admirinda en ĉi tiu verkisto: lia giganta kapablo absorbi alies vivantaĵojn, integri siajn en novajn cirkonstancojn, fari ligojn al aliaj epokoj kaj aliaj lokoj kun detala historio kaj, kun ĉi tiuj ingrediencoj, konstrui vivantajn rakontojn, plenajn je tujeco, aktualaj, se oni permesas al mi la paradokson.» (Eduardo Mayone Dias)

Lingvoamanto, ankoraŭ adoleskulo, Manuel de Seabra lernis Esperanton. La trovo de kelkaj versoj en la originala lingvo en antologio de katalunaj verkistoj tradukitaj al ĉi tiu nova lingvo vekis lian atenton. Pere de Barcelona esperantisto, Seabra ricevis katalunan gramatikon kaj tiel komencis la historio kiu lin portis ĝis tie ĉi.

Manuel de Seabra ĉiam malfidis la trivitajn vojojn de la oficialaj versioj, kvietigantaj la konsciojn. Li ĉiam preferis rigardi transen, la alian vizaĝon de la aferoj, naĝi kontraŭ la fluo, konvinkita ke ne vanas ĉiu malgranda strebo cele transformi la realon. «Li elektis Esperanton –la malimperialismo iĝinta lingvo– kaj ne idiomo, kiu, kiel tiom da aliaj, ankaŭ estis instrumento de kolonigado kaj, instalinte en Katalunio, kaj kiel ordonas la reguloj de la plej elementa kunvivado, li elektis la lingvon de la lando, ... Mi parolas pri literaturo kaj pri aŭtoro kiu, en la nuna tempo, ne tre ofte aperas. Oni devas, do, danki al li pro tio.» (August Bover i Font)

Li kaj lia edzino edzino, Vimala Devi, interrilatis kun Salvador Espriu, grava kataluna poeto –ankaŭ jaron post jaro Nobel-premio kandidato–, pri elkatalunigo de iuj el liaj verkoj en la portugalan kaj en Esperanton.

Manuel de Seabra, en 2001 ricevis la katalun-registaran distingon Creu de Sant Jordi (Kruco de Sankta Georgo), unu el la plej altaj civilaj distingoj aljuĝitaj en Katalunio.

## PROGRAM-KONTRIBUANTOJ



**Abel Montagut** (Llardecans, Les Garrigues, Katalunio, 1953). Li estis mezlerneja instruisto dum pli ol 30 jaroj. Li estas aŭtoro aŭ kunaŭtoro de pluraj libroj en esperanto kaj en la kataluna kiel *Poemo de Utnoa*, *Karnavale*, *La enigmo de l' araneo*, *El manuscrit de Jules Verne*. Kiel tradukisto menciindas *Amkantoj, 60 poemoj de Ausias Marc* (aŭzias mark). *Terre-Noire / Terra-negra / Tierranegra* estas lia lasta kunverko, surbaze de la lasta romano de Jules Verne. Li estas membro de la literatura Ibera Skolo, de pluraj asocioj Jules Verne, de la Asocio de Katalunlingvaj Verkistoj (AELC) kaj de la kataluna Pen-Centro.



**Alfons Tur** (1967), denaska esperantisto, filo de la esperantisto Alfons Tur i Thomas. Licenciulo pri ekonomiko, nuntempe estas funkciulo de la kataluna administracio. Dum jaroj helpis en la esperanto agado de sia patro, li membras de jaroj en UEA kaj ĉeestis diversajn UK-ojn kaj de pluraj jaroj kunlaboras en KEA, kies sekretario li estas nuntempe.



**Amri Wandel** (1954), profesoro pri astrofiziko en la Universitato de Jerusalemo. Ĉefaj esplortemoj: nigraj truoj kaj astrobiologio. Dum ĉ. 20 jaroj instruis astrofizikon al pli ol 2,000 studentoj en la Universitato de Jerusalemo kaj gvidis stel-observajn ekskursojn por studentoj kaj por la publiko.
Prezidanto de Akademio Internacia de la Sciencoj, prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo, akademiano, sekretario de Internacia Kongresa Universitato. Antaŭe multjara estrarano de UEA, iama prezidanto de TEJO. Verkisto de pluraj


libroj kaj centoj da artikoloj, inkluzive de *La Kosmo kaj Ni* (kun David Galadí).



**Antoni Clavell** (Barcelono, 1939). Li lernis E-on aŭtodidakte en 1956 kaj ekde tiam, ĉiam praktikis iom, sed neniam aktive nek sufiĉe. En 1959 finis studadon pri mekanika inĝeniero kaj poste studis kaj laboris pri la scienco de la materialoj (precipe metalografio, termika traktado de metaloj, ktp). Liaj preferaĵoj estas tre (tro) diversaj: astronomio, studado de lingvoj, statistiko (komputado kaj eksperimenta desegno), muziko (ludado de instrumentoj, aŭdado), botaniko (plantidentigado, eŭropaj orkideoj), mikologio, komputilprogramado, meteologio, edukado kaj didaktiko, fotografio (foti kaj retuŝi), vojaĝoj, ŝakludo, ktp.



**Benito Muros** naskiĝis en Kordovo kaj loĝas en Katalunio. Edziĝinta, kun du infanoj. Licenciulo pri ekonomiko. Li mastras teknologian entreprenon kiu destinas parton de ĝiaj profitoj al humana tasko. Li denuncas la degenero de la planedo pro senlima fabrikado. Li kredas je scienco.




**Christian Aguilera** (Barcelono, 1967), licenciulo pri biologiaj sciencoj, samtempe, pro la centjariĝo de kino, fondis kaj direktis la revuon *Seqüències de cinema* (*Kinaj sekvencoj*). Aŭtoro de pluraj libroj pri kino, inter aliaj, *Stanley Kubrick: krea odiseado* (1999), *La kinaj direktoroj de la dudeka jarcento* (1999), *La generacio de la televido: la liberala konscienco de la amerika kino* (2000), *La aktoroj de la Oskaroj [1927-2003]* (2003), *Milos Forman: la direktoro de la nekonformismo* (2006) kaj *Joseph L. Mankiewicz: renesancano en Hollywood* (2009), kaj kunaŭtoro de *Historio de brita kino (2013)*. Ĝi ankaŭ kreis en

2001 la retejon www.cinearchivo.com (poste renamita laŭ www.cinearchivo.net), la plej kompleta datumbazo en la hispana lingvo, kaj estas la aŭtoro de *La Enigmo Haldane* (2011), lia unua romano. Pri muziko ĝi aŭtoras *Jerry Goldsmith: muziko por Kameleono* (2014), *Neil Young: nekonata legendo* (2015) kaj *Historio de simfonia rokenrolo* (2016). Li nuntempe preparas lian duan romanon.



**David Galadí** (Kordovo, Hispanio, 1969), astrofizikisto. Studis fizikon en la universitatoj de Granado kaj Barcelono. Li doktoriĝis pri astrofiziko en ĉi tiu dua universitato en la jaro 1998, kaj tie li instruis kiel profesoro dum tri jaroj. Dum tiu tempo, li aktive partoprenis la unuajn paŝojn de la projekto por konstrui astronomian instalaĵon en Àger-Montsec. Poste li laboris kiel esploristo en la Centro pri Astrobiologio, apud Madrido, kaj en la Astrofizika Instituto de Andaluzio (Granado). Nuntempe li laboras kiel profesia astronomo en la Observatorio de Calar Alto, german-hispana centro en la provinco Almerio. Li esperantiĝis en la jaro 1984, dum sia lernado en la gimnazio Séneca de Kordovo.



**Esther Inglada** (Barcelono, 1970), ekonomikisto, DUODA-magistro kaj historia amatoro. Àger-anino laŭ adopto, libertempa gvidisto de la Kapitula Preĝejo Sant Pere d'Àger ekde 2005. Prezidanto de la Loka Komitato de la Kongreso.



**Joan Inglada** (1945). Inĝenieraj kaj humanismaj studoj (1959-2017). Sufiĉe multe plurpostena laboristo ĉe industrio (1961-2005). Esperantiĝo en 1978. Emeritiĝo (2005). Fakulo pri nenio kaj duba pri ĉio, tamen neperfekte.



**Jordi Bilbeny**, (Arenys de Mar, 1961), kataluna verkisto kaj esploristo. Li estas konata pro siaj tezoj pri la kataluna identeco de Kolumbo kaj aliaj. Licenciulo pri Kataluna Filologio ĉe la Aŭtonoma Universitato de Barcelono kaj doktoranto pri Moderna Historio ĉe la Universitato de Barcelono, kun la tezo haltigita pro retiriĝo de la akademia subteno. Ekde 1990 li estis membro de la Centro por Kolumbaj Studoj ĝis 2004 kiam forlasis ĝin pro malkonsentoj. Tiam kreis la Fondaĵon de Historiaj Studoj de Katalunio (FEHC), kiun ankaŭ li forlasis en la somero de 2007. Membriĝis ĉe Nova Historio-Instituto en 2008.




**Jorge Camacho** (Hispanujo, 1966), poeto, novelisto, eseisto kaj tradukisto. Ĉefaj verkoj: esee *La liturgio de l' foiro*, rakonte *Sur la linio* kaj Ekstremoj, prozaĵe *La ĉapo de la sterko-vermo*, satira novelo *La Majstro kaj Martinelli*, poemare *Celakantoj*, *Saturno*, *Eklipsas*, *Koploj kaj filandroj*, *La silika hakilo*, *En la profundo*, *Strangaj spikoj* kaj *Palestino strangolata*. Tradukis *Letero el Palestino*-n de Santiago Alba, poemojn de Ángel González en *Astura bukedo*, novelojn kaj poemojn de Jorge Luis Borges en *La sekreta miraklo*. Lanĉis kaj kunredaktis de 2007 ĝis 2014 la literaturan revuon *Beletra Almanako*, al kiu li abunde kontribuis kaj plu kontribuas.

**Kaj Tiel Plu** estas muzika ensemblo. Ludas kantojn kaj dancojn el Okcitanio, el la Kataluna Landaro kaj el diversaj monderoj, (inkluzive mezepoka muziko, sefarda kaj trobadora) kaj kantverkistajn kantojn. En Esperanto kaj ankaŭ en la originalaj lingvoj, t.e. okcitana, kataluna, latina, hispana, judhispana, ktp. Muzikoj tutmondaj laŭ propra stilo, kaj por aŭskulti kaj por danci.

**Mas Garcia Muret** estas familia kelo kiu celas produkti altkvalitajn vinojn ene de la origin-indika nomo Costers del Segre, situata proksime de Llimiana, norde de Montsec. La vinoj "Unua" kaj "Juna" rezultis de ĵusa rilato inter la kelo kaj Esperanto.



**Miguel Fernández (**Granado, Andaluzio, Hispanio, 1950), poeto, eseisto kaj tradukisto. En 1968 li transloĝiĝis en Madridon kaj ekstudis en ties Politeknika Universitato. Li estis edukita pri solfeĝo kaj kanto-arto. Esperantistiĝis en 1980. Iniciatinto de la Lirikaj Festoj de HEF, kunfondinto de la Ibera Skolo aŭ Ibera Grupo de E-verkistoj. Gajnis plurajn premiojn en la Belartaj Konkursoj de UEA kaj en la Internaciaj Floraj Ludoj. Li prelegis en multaj Esperanto-kongresoj, ĉefe pri poezio kaj literaturo ĝenerale, krom ke li ankaŭ deklamadas kaj kantas. Kunlaboras en diversaj revuoj, inter ili *Beletra Almanako*, *Sennaciulo*, *Sennacieca revuo* kaj *Boletín de HEF*. Li estas poeto, novelisto kaj eseisto, krom tradukisto de Lorca, Miguel Hernández, Valle-Inclán kaj multaj hispanaj, ĉefe kritikaj, poetoj.




**Miguel Gutiérrez Adúriz**, verkisto kaj eldonisto en la internacia lingvo Esperanto. Liaj plejkonataj alnomoj estas Liven Dek, Sven Dun, Maria Zocato per kiu subskribas liajn poemojn, fikciojn, artikolojn kaj tradukojn. Ĝi estas konata kiel membro de Iberia Skolo en Esperanto. Li estas kemia inĝeniero kaj lernis Esperanton 19-jara. Kiel eldonisto estas konata pro la kolekta mastrumado de scienc-fikciajn serioj *Sferoj*, *Orbito nula* kaj *Future*, kaj aliaj verkoj de pluraj aŭtoroj en Esperanto. Dum multaj jaroj li estis redaktoro de la *Bulteno de la Hispana Esperanto-Federacio*. Li kontribuis al diversaj kolektivaj verkoj kaj revuoj kaj gajnis plurajn premiojn en literaturaj konkursoj (Belartaj Konkursoj) organizita de UEA. Iama membro de la Akademio de Esperanto.



**Mon Cardona** fakas pri dancoj kaj tradiciaj muzikoj de la tuta mondo. Li estas instruisto pri dancado kaj ludas diatonan akordionon kaj tradician katalunan fluteton. Li muzikas en du bandoj: Tercet Treset kaj Sants & Fot.



**Pedro M. Martin Burutxaga** (Bilbao, 1958), licenciulo pri filologio kaj gimnazia profesoro pri fremdaj lingvoj. Membro de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Li publikigis plurajn artikolojn en revuoj *Kataluna Esperantisto* kaj *Internacia Pedagogia Revuo*. En la kataluna estas aŭtoro de *Historio de la Esperanto-movado en Vendrell*, premio Sant Ramon de Penyafort pri Mallonga Eseo 1992 kaj *Malgranda proverbaro Kataluna-Esperanta*, kun antaŭparolo de Victor Pàmies i Riudor, lingvisto specialisto pri proverbologio.



**Pedro Sanz**, eldonisto**.** Memlernanto de E-o, baldaŭ post sia esperantistiĝo li aliĝas al la tutmondaj E-asocioj SAT kaj UEA, kaj al diversaj lokaj grupoj. Precipa prizorganto de la retejo kaj la libroservo de SATeH. Dumviva membro de SAT, kies membro li estas ekde 1992. Ĉeforganizanto de la 86a kongreso de SAT (Madrido, 2013). Nuntempe membro de ĝia Plenum-Komitato kaj ĉefredaktoro de ĝia organo, la revuo *Sennaciulo*.



**Ramon Perera**. Post diversaj anekdotaj kontaktoj kun esperanto ek de lia junaĝo, li ekinteresiĝis serioze pri ĝi en 1984 kaj ilia rilato jam ne ĉesis. Esperanto estas por li neŭtrala komunikilo inter malsamaj kulturoj.



**Rubén Fernández Asensio** ricevis diplomon pri kataluna filologio de la Universitato de Barcelono en 1998, jaro kiam esperantistiĝis, kaj loĝis en Koreio en 2000-2001 kaj 2006-2007 kiel studento de la korea lingvo, kaj en 2002-2003 en Japanio kiel instruisto de la hispana. En 2004-2006 kaj 2007-2009 loĝis en Havajio, en kies universitato magistriĝis pri aplikita lingvistiko kaj hispana filologio, per verkaĵoj publikigitaj en akademiaj ĵurnaloj. Nuntempe instruas la katalunan en ŝtataj altlernejoj de sia lando kaj doktoriĝas en la Universitato de Barcelono, kie instruis kurson pri enkonduka lingvistiko en 2015. Ankaŭ instruas Esperanton ekde la jaro 2000.



**Xavier Alcalde** estas doktoro pri politikaj sciencoj, nuna esploristo ĉe la centro de studoj pri sociaj movadoj en la Scuola Normale Superiore de Florenco. Inter liaj areoj de esploro estas la pacismo, la historio de Esperanto kaj la debatoj pri la lingva justeco ekde la politika filozofio.

## PROGRAMEROJ

### Ĵaŭde

**Enkonduko al Esperanto I** (2 horoj, en la kataluna)
› Pedro M. Martin Burutxaga
Ĵaŭdon la 12an, salono Benet Rossell, je la 11a horo

**Prezento: *Tagoj kaj ruinoj*, la ekzilo de Jaume Grau Casas**
› Miguel Fernández
Ĵaŭdon la 12an, salono Zamenhof, je la 16a horo

Taglibro verkita de la kataluna E-poeto Jaume Grau Casas, kompilinto kaj ĉefa tradukinto de Kataluna Antologio, kiu rakontas ĉiujn malfeliĉojn, sortobatojn, misfortunojn, missortojn, fatalaĵojn, mizerojn, ktp, suferitajn de li kaj de liaj tieaj kompanoj, dum lia ekzilo el la hispana enlanda milito en francaj koncentrejoj. Tamen en 1944 li skribis: «Mi ne plendas pri la malsato, la soifo aŭ la morto, mi plendas pri tio, ke oni murdis mian liberecon.»

**Mazzi en Gondolando**
› Esther Inglada
Ĵaŭdon la 12an, salono Manuel de Seabra, je la 16a horo

Rektmetoda video-kurso en esperanto, por komencantaj infanoj, junuloj kaj plenaĝuloj eldonita de IEI (Internacia Esperanto-Instituto).

**Laborrondo pri legado kaj/aŭ verkado de poemoj**
› Jorge Camacho
Ĵaŭdon la 12an, salono Zamenhof, je la 17a horo

Kunportu poemojn ĉu proprajn ĉu aliulajn, ĉu pretajn ĉu nefinitajn, kaj pretu kunbabili kaj kuncerbumi pri poezia kreado en Esperanto.

**Gustumado de la vinoj "Unua" kaj "Juna"**
› Mas García Muret
Ĵaŭdon la 12an, salono Benet Rossell, je la 17a horo

Prezento kaj gustumado de la vinoj "Unua" kaj "Juna" kaj ilia rilato kun Esperanto. La kelo situas en Llimiana, apuda vilaĝo.

## Prelego-kolokvo: Sennaciulo: ĉu senlima libera esprimado?

› Pedro Sanz
Ĵaŭdon la 12an, salono Zamenhof, je la 18a horo

Priskribo de la ellaborado de la revuo *Sennaciulo*, organo de SAT, kun aparta emfazo pri la disvolviĝanta dialogo inter legantoj, redaktoroj kaj verkistoj. Per malferma kolokvo, laŭeble ekiranta el la bildo de la aŭskultantoj pri SAT kaj *Sennaciulo*, oni provos klarigi miskomprenojn kaj kontraŭbatali antaŭjuĝojn pri ili, samtempe reliefigante iliajn malferman karakteron, enhavan buntecon kaj diversecon de kunekzistantaj opinioj.

## Stellumo kaj malhela ĉielo

› David Galadí
Ĵaŭdon la 12an, salono Zamenhof, je la 19a horo

Duono el la ekzisto de la Tero okazis en noktaj kondiĉoj. Nokto estas parto de naturo, kaj la malheleco de noktaj pejzaĝoj konsistigas esencan trajton, al kiu adaptiĝis la vivo dum milionoj da jaroj. Ni prezentos la malhelecon de la noktoj kiel pozitivan valoron, kaj ni klarigos la gravecon de nature malhelaj noktaj pejzaĝoj por biologio, por scienco, por turismo kaj eĉ por la sano de homoj.

## Observada nokta sesio en la Parko de Teleskopoj

› David Galadí
Ĵaŭdon la 12an, je la 22a horo

David Galadí-Enríquez, pioniro de la Astronomia Parko Montsec, kiu nun laboras kiel astronomo en la german-hispana Observatorio de Calar Alto, gvidos tiun observadan noktan sesion.

## Prezentado de planetaria sesio ĉe Okulo de Montsec

› David Galadí kaj Amri Wandel
Ĵaŭdon la 12an, Centro por Observado de la Universo, je la 22a horo

Amri Wandel 20-jaran sperton de lekciado pri astronomio kaj astrofiziko en la Universitato de Jerusalemo kaj gvidado de stel-observaj ekskursoj por studentoj kaj por la publiko.

## Prezento de la kongreshomaĝatoj Manuel de Seabra kaj Benet Rossell + Origino de Montsec-montaro

› Joan Inglada
Ĵaŭdon la 12an, salono Zamenhof, je la 22a horo

Legu pri la kongreshomaĝatoj je la unuaj paĝoj.

## Vendrede

### Eksterordinara assembleo de KEA
› Vendredon la 13an, salono Zamenhof, je la 10a horo

### Enkonduko al Esperanto II (2 horoj, en la kataluna)
› Pedro M. Martin Burutxaga
Vendredon la 13an, salono Benet Rossell, je la 10a horo

### Lucia, aĵera eksterterulino
› Esther Inglada
Vendredon la 13an, salono Manuel de Seabra, je la 11a horo

Lucia vivis dek jarojn, sufiĉe pli da tempo ol ni iam ajn revis. Ŝia vivo estis nepenetrebla kaj tenera mistero..

### Piedira ekskurso laŭ itinero 9
› Joan Inglada
Vendredon la 13an, ekstere, je la 10a horo

http://www.ccnoguera.cat/ager/index.php/descobreix/itineraris-i-rutes

### Esperanto per scienco kaj scienco per E-o
› Amri Wandel
Vendredon la 13an, salono Zamenhof, je la 12a horo

Montri tiun socie unikan fenomenon, ke per Esperanto oni povas organizi internaciajn konferencojn sen lingva diskriminacio, kiu estas grava obstaklo por sciencistoj el ne-anglalingvaj landoj. Sciencistoj el ne-angle-parolantaj landoj ofte spertas la lingvajn barojn kiam ili provas raporti pri sia esploro en internaciaj forumoj. Kontraŭe, universitata instruado kutime okazas en la nacia lingvo, kaj ekzistas do lingva breĉo inter la instrua kaj labora-konferenca nivelo. Esperanto povas solvi tiujn problemojn kiel internacia komunika lingvo.

### Babilu pri poemoj kun la autoro!
› Jorge Camacho
Vendredon la 13an, salono Manuel de Seabra, je la 12a horo

Jorge Camacho prezentas plurajn el siaj poemoj (el la jamaj poemaroj kaj el la sekva, ankoraŭ ne publikigita) al publiko, invitante tiun ĉi al neformala dialogo pri ili.

## Prezentado de stela kaj planeda komputil-programo HNSKY.

› Antoni Clavell kaj Ramon Perera
Vendredon la 13an, salono Benet Rossell, je la 13a horo

Temas pri tute senpaga programo por Vindozo kaj Linukso, kies uzado estas tre simpla kaj ĝustigebla. Ĝia akurateco estas bonega, kaj kompare al aliaj programoj, elstaras ĝia rapideco je la ekranprezentado (ankaŭ en malrapidaj komputiloj), kaj ĝiaj multaj tujaj klavoj, tre utilaj por la datpretigado kaj aliaj funkcioj.
HNSKY estas tre diversuza por prepari sesionojn pri observado de planedoj, asteroidoj, kometoj, steloj kaj profundĉielaj objektoj. Ankaŭ komandas teleskopojn, eblas desegni tre precizajn horizontojn el la loka observsituo, permesas montri sunan kaj lunan eklipsojn kaj planedkaŝadojn. Eblas gardi aŭ alŝuti savitajn mapojn aŭ ĝustigon, kaj peras tre klaran ekranprintadon. Ankaŭ havas animadon de la sunaj objektoj, interreta aŭtomate ĝisdatigo de kometoj kaj asteroidoj, aŭ montrado de bildoj. Ktp.

## Astrobiologio kaj ekstertera vivo, scienca evidenteco

› Amri Wandel
Vendredon la 13an, salono Zamenhof, je la 16a horo

La demando ĉu ekzistas vivo en la spaco, estas malnova, sed en la lastaj jaroj astronomoj povas provizi respondojn bazitajn sur sciencaj esploroj kaj faktoj. En nia sunsistemo estis trovitaj signoj de likva akvo sur la planedo Marso kaj sur la glacia luno Europa de la planedo Jupitero. En aliaj sunsistemoj, la spacteleskopo Kepler malkovris milojn da planedoj, pluraj similaj al Tero kun potencialo de vivo. En augusto 2016 oni malkovris tian planedon apud la plej proksima stelo, ruĝa malgranda suno nomata Proksima Kentauro. La podiulo montros la sciencan motivigon al la surpriza konkludo – ke vivo verŝajne estas tre ofta, kaj post nelonge ni povos tion konfirmi per la novaj teknologiaj rimedoj.

## Gvidata vizito al Kapitula Preĝejo Sant Pere.

› Esther Inglada
Vendredon la 13an, kapitula preĝejo de Sankta Petro, je la 16:30a horo

Oni vizitos la kastelon kiu havas serion de gravaj restaĵoj, inkluzive la restaĵon de la eble maŭra defenda muro, la kapitulan preĝejon de la 11a jarcento, la arkaĵejon de la 14a, kaj la kapitulan domon de la 16a jarcento.

## Laŭplana malnoviĝo, ekonomia kresko kaj kredito (en la hispana)

› Benito Muros
Vendredon la 13an, salono Zamenhof, je la 17a horo

La laŭplana aŭ enkonstruita malnoviĝo planas la finon de la utila vivo de produkto tiel ke ĝi iĝas neuzebla post periodo kalkulita por la celo de tuja ekonomia profito,

kie la medio kaj tial la homaro fariĝas duaranga prioritato. La fundamentoj de la socia kresko estas la reklamado, enkonstruita malnoviĝo kaj kredito. Arto fariĝis reklamado. Objektoj kiuj estas fabrikitaj nun, ripari ilin kiam difektiĝas estas pli multekoste ol aĉeti iun novan. Kredito estas elekto kiu permesas deprunti ĉiam pli kaj multaj ekonomikistoj scias, ke ĉi tiu situacio estas neeltenebla sed silentas.

## Ĉu eksterteraj vizitantoj? Ekzkluziva intervjuo kun Idovi Daa

› Abel Montagut
Vendredon la 13an, salono Benet Rossell, je la 17a horo

Abel Montagut faros demandojn al Idovi-22, filo de Daa-35, rilate al lia planedo, al lia opinio pri Terplanedaj aferoj aŭ gravuloj, al liaj vojaĝoj kaj misio, k.t.p. kun la celo pli bone koni la perspektivon kaj pensmanieron de aliplanedano.

## Akceptado de la urbestro kaj omaĝo al L.L. Zamenhof

› Vendredon la 13an, Urbodomo, je la 18:00a horo

**Salutvortoj**

› Lluís Ardiaca i Montardit, urbestro de Àger, kaj Josep Franquesa Solé, prezidanto de la Kataluna Esperanto-Asocio

**Prelego «Pacistoj en mondo eterne militanta, en la centjariĝo de la morto de Zamenhof»**

› Xavi Alcalde (katalune kun esperantigo de Alfons Tur)

Prelego okaze de la Zamenhofa Unesko-jaro. «Ĉi-jare ni memoras la figuron de Ludoviko Zamenhof, kiu forpasis antaŭ 100 jaroj, sed forlasis nin tutan socian movadon kiu ankoraŭ subtenas lian fortan markon. D-ro Zamenhof mortis meze de la Granda Milito, seniluziigita de mondo, kiu ŝajne ne scias solvi aferojn, sen uzo de forto, sed ankaŭ espere pri la nova generacio, kiu postvivos kaj konstruos pli ĵusan mondon. Kaj pri militoj kaj persekutadoj la esperantistoj iom scias. Ĉi-jare ni ankaŭ omaĝos la estimatan Jaume Grau Casas, ekzilita en la francaj koncentrejoj dum la Dua Mondmilito. Kaj ni provos tiri historiajn lecionojn por la nuno kiu koncernas nin. Mondo, kiu daŭre estas eterne militanta kaj kie esperanto ankoraŭ havas ion por diri.»

**Poemo *Les cases* (*La domoj*) de Benet Rosell**

› infanoj de la Àger-lernejo

La infanoj ĝin recitos katalune, rumane, arabe, hispane kaj esperante.

**Kanto de la esperanta himno *La Espero***

› Koruso de Àger

### Prezentado kaj projekcio de la reeldono de *Incubus*, dua filmo en esperanto

› Christian Aguilera – Carles Vela
Vendredon la 13an, salono Benet Rossell, je la 21:30a horo

Prezentado kaj projekcio de *Incubus*, dua filmo en esperanto. Temas pri la reeldona projecto *The Outer Limits*, kiu enhavas kiel ekstra eldonaĵo la filmon *Incubus* kun subtekstoj en la hispana kaj esperanto.

### Popolaj dancoj

› Mon Cardona
Vendredon la 13an, salono Zamenhof, je la 22:00a horo

Temas pri dancigo de internaciaj popol-dancoj diverslandaj.

### Surplaca danco

› Kaj Tiel Plu
Vendredon la 13an, salono Zamenhof, je la 23:00a horo

Post kiam Mon atingos ke la homoj dancu, KTP daŭre proponas dancojn tutmondajn. Ili invitas nin rekte al dancmuziko. Surplacen venu vi!

## Sabate

### Dioj, homoj kaj robotoj

› Miguel Gutiérrez
Sabaton la 14an, salono Zamenhof, je la 10a horo

Kiu kreis la homon? Kiucele? Liven Dek proponas plurajn pensigajn ideojn pri «Dioj, homoj kaj robotoj». La deirpunkto de lia prezento rilatas al roboto rolanta en lia sciencfikcia novelo *Rust'*.

### Enkonduko al Esperanto III (1,5 horoj, en la kataluna)

› Pedro M. Martin Burutxaga
Sabaton la 13an, salono Benet Rossell, je la 10a horo

## En la radikojn de anglalingva tutmondiĝo: pra-kolonia lingvopolitiko en Havajio

› Rubeno Fernández
Sabaton la 14an, salono Manuel de Seabra, je la 10a horo

Nuntempe, la havaja lingvo estas severe endanĝerigita ĉar ĝin parolas malpli ol 2% el ĉiuj loĝantoj de la insularo Havajio (Hawaiʻi). Inter endanĝerigitaj lingvoj, tamen, ĝi estas sufiĉe aparta tial, ke antaŭ la okupo de Havajio fare de Usono ĝi estis la plej parolata lingvo de sendependa regno, kies suverenecon agnoskis la tiamaj mondaj potencoj. Ĉi tiu prelego superrigardos la lingvopolitikan historion de Havajio kaj pliprofundiĝos en la tempon de la oficialigo de la angla lingvo tie, por esplori la kialojn de la enkonduko de la angla lingvo en lernejojn.

## La leono kaj la muso

› Esther Inglada
Sabaton la 14an, salono Manuel de Seabra, je la 11a horo

Fablo de Ezopo kiu montras reciprokan dependecon nekonsiderante grandecon aŭ statuson.

## 525a datreveno de la unua vojaĝo de Kolumbo kiel rompo de la limoj de la konata mondo (en la kataluna kun flustra interpretado)

› Jordi Bilbeny
Sabaton la 14an, salono Zamenhof, je la 11:30a horo

La prelego estos por pruvi la katalunecon de Kristoforo Kolumbo kaj tiun de liaj transoceanaj vojaĝoj kaj la partopreno de la katalunoj en la unuaj momentoj de la kolonigo, konkero, evangelizado kaj setlado ĉe la Nova Mondo. Kolumbo naviganto, humanisto, militisto kaj ŝtatisto estos identigita kun la politikisto, komercisto, militisto kaj ŝtatisto Joan Colom i Bertran. Kaj oni klarigos, kiel simila manipulado de la historiaj eventoj eblis, ĝis ilin oni reduktis en la groteskan karikaturon, kiun oni rakontas al ni. Por kompreni ĉi tion, la preleganto klarigos, kio estas la cenzuro de la ŝtato, sur kiu leĝoj baziĝis, kiuj ĝin realigis kaj kiujn librojn kaj dokumentojn ĝi trafis. Ni komprenos do, ke la katalunoj sin trovas antaŭ leĝa operacio, ekzekutita de la fortoj de la hispana Ŝtato kaj la Inkvizicio kun la sola celo alproprigi al si la katalunan historion kaj ŝajnigi ĝin kiel hispanan, kaj tiel forviŝi Katalunion kiel nacion, de la vizaĝo de la tero. Tamen la spuroj, la dokumentoj, kaj la evidentecoj, kiuj postvivis, ilin malkaŝas kaj helpas la katalunojn rekonstrui la pasintecon. La prelego ankaŭ provos restarigi la katalunan kolektivan memoron antaŭplanite detruita.

## Nigraj truoj

> Amri Wandel
Sabaton la 14an, salono Benet Rossell, je la 11:30a horo

## Laborrondo pri legado kaj verkado de poemoj

› Jorge Camacho
Sabaton la 14an, salono Manuel de Seabra, je la 11:30a horo

Kunportu poemojn ĉu proprajn ĉu aliulajn, ĉu pretajn ĉu nefinitajn, kaj pretu kunbabili kaj kuncerbumi pri poezia kreado en Esperanto.

## Kongresa Fermo

> Kaj Tiel Plu
Sabaton la 14an, salono Zamenhof, je la 13:00a horo

Virtuoza koncerto

## Fratec-adiaŭa bankedo

› Sabaton la 14an, salono Zamenhof, je la 14:00a horo

# POSTKONGRESO

› Ekskursoj: sabate motorboataj al Kanjono Mont-Rebei kaj piediraj al mont-pasejo Port d'Àger tra la Romia Vojo; dimanĉe laŭ itinero 6.
(http://www.ccnoguera.cat/ager/index.php/descobreix/itineraris-i-rutes)

## ĴAŬDON LA 12AN DE OKTOBRO

| | SALONO ZAMENHOF + LIBROSERVO | SALONO BENET ROSSELL | SALONO MANUEL DE SEABRA |
|---|---|---|---|
| 10:00-11:00 | Sin prezenta mateno / kongreseja finpretigo | | Akceptejo |
| 11:00-12:00 | | Enkonduko al Esperanto I / Pedro M. Martin Burutxaga (en la kataluna) | |
| 12:00-13:00 | | | |
| 16:00-16:50 | Prezento: *Tagoj kaj ruinoj*, la ekzilo de Jaume Grau Casas, kompilinto de *Kataluna Antologio* / Miguel Fernández | | Mazzi en Gondolando / Esther Inglada |
| 17:00-17:50 | Laborrondo pri legado kaj verkado de poemoj / Jorge Camacho | Gustumado de la vinoj "Unua" kaj "Juna" / Mas García Muret | Akceptejo |
| 18:00-18:50 | Prelego-kolokvo - Sennaciulo: ĉu senlima libera esprimado? / Pedro Sanz | | |
| 19:00-19:50 | Stellumo kaj malhela ĉielo / David Galadí | | |
| 22:00-24:00 | Prezento de la kongreshomaĝatoj Manuel de Seabra kaj Benet Rossell + Origino de Montsec-montaro/ Joan Inglada | ALIAJ AREOJ<br>**Teleskopa Parko** / David Galadí; **Planetario** / Amri Wandel | |

## VENDREDON LA 13AN DE OKTOBRO

| | SALONO ZAMENHOF + LIBROSERVO | SALONO BENET ROSSELL | SALONO MANUEL DE SEABRA | ALIAJ AREOJ |
|---|---|---|---|---|
| 10:00-11:00 | Eksterordinara assembleo de KEA | Enkonduko al Esperanto II / Pedro M. Martin Burutxaga (en la kataluna) | Disko-servo / Flo | Ekskurso laŭ itinero 9 |
| 11:00-11:50 | | | Lucia, aĵera eksterterulino / Esther Inglada | |
| 12:00-12:50 | Esperanto per scienco kaj scienco per E-o / Amri Wandel | Babilu pri poemoj kun la autoro! / Jorge Camacho | Disko-servo / Flo | |
| 13:00-13:30 | | Prezentado de planetaria komputil-programo HNSKY / Ramon Perera, Antoni Clavell | | |
| 16:00-16:50 | Astrobiologio kaj ekstertera vivo, scienca evidenteco / Amri Wandel | | | 16: 30 – 17: 50 Gvidata vizito al Kapitula Preĝejo Sant Pere / Esther Inglada |
| 17:00-17:50 | Laŭplana malnoviĝo, ekonomia kresko kaj kredito / Benito Muros (en la hispana) | Ĉu eksterteraj vizitantoj? Ekzkluziva intervjuo kun Idovi Daa / Abel Montagut | | |
| 18:00-19:30 | SALONO ZAMENHOF<br>**Akceptado de la urbestro kaj omaĝo al L.L. Zamenhof**<br>Salutvortoj de la Àger-a urbestro kaj de la prezidanto de KEA<br>Prelego: "Pacistoj en mondo eterne militanta, en la centjariĝo de la morto de Zamenhof" / Xavier Alcalde, katalune, kaj Alfons Tur, e-e<br>La infanoj de la Lernejo recitos Benet Rossell en la kataluna, rumana, araba, hispana kaj Esperanto<br>Àger-a Koruso kantos la himnon *La Espero* | | | |

| | SALONO ZAMENHOF + LIBROSERVO | SALONO BENET ROSSELL | SALONO MANUEL DE SEABRA ALIAJ AREOJ |
|---|---|---|---|
| 21:15-22:00 | | Projekcio de la reeldono de *Incubus*, dua filmo en esperanto / Christian Aguilera (en la kataluna) | Disko-servo / Flo |
| 22:00-23:00 | Popolaj dancoj / Mon Cardona | | |
| 23:00-00:30 | Surplaca danco / Kaj Tiel Plu | | |

## SABATON LA 14AN DE OKTOBRO

| | SALONO ZAMENHOF + LIBROSERVO | SALONO BENET ROSSELL | SALONO MANUEL DE SEABRA |
|---|---|---|---|
| 10:00-11:00 | Dioj, homoj kaj robotoj / Miguel Gutiérrez | Enkonduko al Esperanto III / Pedro M. Martin Burutxaga (en la kataluna) | En la radikojn de anglalingva tutmondiĝo: pra- kolonia lingvopolitiko en Havajio / Rubeno Fernández |
| 11:00-11:20 | ALIAJ AREOJ | | La leono kaj la muso / Esther Inglada |
| | 1-a ekskurso al Gorĝo Mont-rebei (motorboata navigado) kaj Piedira ekskurso laŭ itinero 10 | | |
| 11:30-13:00 | S. ZAMENHOF | S. BENET ROSSELL | Laborrondo pri legado kaj verkado de poemoj / Jorge Camacho |
| | 525a datreveno de la 1a vojaĝo de Kolumbo; la ekspansio de la konata mondo / Jordi Bilbeny (en la kataluna kun flustra interpretado) | Nigraj truoj / Amri Wandel | |
| 13:00-14:00 | Kongresa Fermo / Koncerto Kaj Tiel Plu | | |
| 14:00-16:00 | Fratec-adiaŭa **BANKEDO** | | |

# POST-KONGRESO

| | |
|---|---|
| | SABATON LA 14AN  DE OKTOBRO |
| 16:30 | Ekskurso al Gorĝo Mont-rebei (motorboata navigado) kaj piedira ekskurso al mont-pasejo Port d'Àger tra la Romia Vojo (http://www.ccnoguera.cat/ager/index.php/descobreix/itineraris-irutes) |
| 17:30 | Ekskurso al Gorĝo Mont-rebei (motorboata navigado) |
| | Jen aliaj eblecoj ĉe: http://montsecactiva.com, http://www.zenithaventura.com, http://www.entrenuvols.com |
| | DIMANĈON LA 15AN  DE OKTOBRO |
| matene | Piedira ekskurso laŭ itinero 6 |

## LISTO DE ALIĜINTOJ

Aliĝintoj ĝis la 9a de oktobro 2017

| | | |
|---|---|---|
| 1. | Joan Inglada Roig | Agulló (Katalunio) |
| 2. | Ferriol Macip i Bonet | Barcelona (Katalunio) |
| 3. | Ramon Perera Perera | Barcelona (Katalunio) |
| 4. | Pilar Cardona Méndez | Agulló (Katalunio) |
| 5. | Pedro M Martín Burutxaga | Blanes (Katalunio) |
| 6. | Michael Boris Mandirola | Novara (NO) |
| 7. | Lluís Aragay i Albaladejo | Barcelona (Katalunio) |
| 8. | Vicky Saludes Cuberas | Barcelona (Katalunio) |
| 9. | Viktoro Solé | Barcelona (Katalunio) |
| 10. | Alfons Tur García | Barcelona (Katalunio) |
| 11. | Irene Tur Pérez | Barcelona (Katalunio) |
| 12. | Ana Maria Perez Prado | Barcelona (Katalunio) |
| 13. | Jorge Camacho | Madrid (Hispanujo) |
| 14. | Josep Maria Milla i Saldón | Mataró (El Maresme) |
| 15. | Amri Wandel | Jerusalem (Israel) |
| 16. | Abel Montagut | Cervià de les Garrigues (Les Garrigues / Katalunio) |
| 17. | Montserrat Martí | Cervià de les Garrigues (Les Garrigues / Katalunio) |
| 18. | Esther Inglada Cardona | Agulló (Katalunio) |
| 19. | Xavi Alcalde | Barcelono/Florenco (Katalunio/Italio) |
| 20. | Saioa Escobar Calzada | Barcelono/Florenco (Katalunio/Italio) |
| 21. | Josep Franquesa Solé | Lleida (Katalunio) |
| 22. | Mundeta Gòdia Forcada | Lleida (Katalunio) |
| 23. | Josep Franquesa Gòdia | Lleida (Katalunio) |
| 24. | Montserrat Franquesa Gòdia | Barcelona (Katalunio) |
| 25. | Montserrat Parera Domènech | Sabadell (Vallès Occidental) |
| 26. | Sebastià Ribes Garolera | Sabadell (Vallès Occidental) |
| 27. | Mateu Camarasa Inglada | Agulló (Katalunio) |
| 28. | Guillem Camarasa Inglada | Agulló (Katalunio) |
| 29. | Karles Berga i Molina | Terrassa (Vallès Occidental) |
| 30. | Joaquim Gestí Bautista | Barcelona (Katalunio) |
| 31. | Joana Sales Cucó | Lleida (Katalunio) |
| 32. | Benito Muros Perfecto | Barcelona (Catalunya) |
| 33. | Ursula NIESERT | Freiburg (Germanio) |
| 34. | Jordi Perera Faura | Castellterçol (El Moianès - Katalunio) |
| 35. | Maria Roser Bach Serra | Castellterçol (El Moianès - Katalunio) |
| 36. | Pedro Sanz Sanz | Collado Villalba (Madrido) |
| 37. | Isabel Martínez Moral | Collado Villalba (Madrido) |
| 38. | Andrea Sanz Martínez | Collado Villalba (Madrido) |
| 39. | Jorge Sanz Martínez | Collado Villalba (Madrido) |

| | |
|---|---|
| 40. Llibert Puig Gandia | Sabadell (Vallès Occidental) |
| 41. Carme Canovas Baños | Sabadell (Vallès Occidental) |
| 42. Jordi Alsina i Bilbeny | Arenys de Mar (Catalunya) |
| 43. M. Dolors Godoy Rotllens | Cassà de la Selva (España) |
| 44. Antonio Vidal Balué | Sant Feliu de Guíxols (Baix Empordà) |
| 45. Miquel Gómez Besòs | Barcelona (Katalunio) |
| 46. Clara Mas Bassas | Barcelono (Katalunio) |
| 47. Maria Josep Udina Abelló | Castelldefels (Barcelona) |
| 48. Josep Solé Alsedà | Castelldefels (Barcelona) |
| 49. Roc Humet Vidal | Vilanova d'Escornalbou (Tarragono, Katalunio) |
| 50. Josep Enric Peres i Blesa | Valencio (Katalunujo) |
| 51. Marta Moliné Golovart | Barcelona (Barcelona) |
| 52. Carles Illa Casanova | Moià (El Moianès/Katalunio) |
| 53. Anna Ma. Molera Urgellés | Moià (El Moianès/Katalunio) |
| 54. Fernando Arroba Rubio | Pedrola (Zaragoza, España) |
| 55. Carles Vela Aulesa | Barcelona (Katalunio) |
| 56. Xabier Rico Iturriotz | Gasteiz (Eŭskio) |
| 57. Teresa Marbà Mas | Barcelona (Barcelona) |
| 58. Paquita García Caballero | Barcelona (Catalunya) |
| 59. Manel Vinyals Allepuz | La Sénia (Montsià) |
| 60. Elena Milla Saldón | Mataró (Maresme) |
| 61. Anna Sánchez Fernández | Mataró (Barcelona, Catalunya) |
| 62. Isaac Barrera Vilà | El Prat de Llobregat (Catalunya) |
| 63. Judith Muñoz Fuentes | El Prat de Llobregat (Catalunya) |
| 64. Francesc Inglada | Tarragona (Tarragonès) |
| 65. Sol Roca | Tarragona (Tarragonès) |
| 66. Mon Cardona Farrés | Barcelono (Kataluna landaro) |
| 67. Glòria Tudanca Ferrero | Camprodon (Kataluna landaro) |
| 68. Eloy Escudero Alonso | Vilanova i la Geltru (Barcelona) |
| 69. Teresa Vila Camps | santa creu ( Olost) (Barcelona) |
| 70. Gila Wander | Jerusalem (Israel) |
| 71. Christian Aguilera Couceiro | Barcelona (Catalunya) |
| 72. Esther Solías Carreras | Barcelona (Catalunya) |
| 73 Arnau Massanas Daunis | Girona (Gironès) |
| 74. Eva Sunyer Planes | Girona (Gironès) |
| 75. Martí Massanas Sunyer | Girona (Gironès) |
| 76. David Galadí Enríquez | Monachil (Andaluzio) |
| 77. Baye Mor Guéye | Dakaro (Senegalo) |
| 78. Talla Diop | Dakar (Sénégal) |
| 79. Jordi Aromi | Mataró (Maresme) |
| 80. Mar Lo | Rufisque (Senegalo) |
| 81. Irina Zakharova | Mataró (Maresme) |
| 82. Núria Aromi Zakharova | Mataró (Maresme - Txubaixia) |

| | |
|---|---|
| 83. Rubén Fernández Asensio | Badalona (Katalunio) |
| 84. Lluís Batlle i Rossell | Olot (Garrotxa) |
| 85. Olga Ĉerniŝova | Olot (Garrotxa) |
| 86. Rimma Batlle Txernixova | Olot (Garrotxa) |
| 87. Miguel Fernández Martín | Madrid (Madrido) |
| 88. Miguel Gutiérrez Adúriz | Muriedas (Cantabria) |
| 89. Antoni Clavell Clusa | Barcelono (Katalunio) |
| 90. Frédéric Neyret | Eybens (Grenoblo, Francio) |
| 91. Òscar Puig i Cánovas | Sabadell (Katalunio) |
| 92. Francis Priestland | Edinburgo (Britio) |
| 93. Andreu Comajuncosas | Mataró (Maresme) |
| 94. Joachim Boehmeke | Randersacker (Germanio) |
| 95. Peru Amorrortu Barrenetxea | Vitoria-Gasteiz (EAE-CAV) |
| 96. Lluís Fontrodona Vilà | Tordera (Maresme, Catalunya) |
| 97. Angels del Pozo Serrano | Barcelona (Barcelones (Katalunio)) |
| 98. Adam Brooking | Brussel (België) |
| 99. Isabel Sáenz Hernández | Barcelona (España) |
| 100. Marion Quenut | Tuluzo (Okcitanio) |
| 101. Floreal Martorell | Donneville (Okcitanio / Francio) |
| 102. Olivia Locher | Toulouse (France) |
| 103. José Salguero | Don Benito (Hispanio) |
| 104. Neil Roberts | Lyon (France) |
| 105. Anna Sorribes Ortí | Barcelona (Katalunio) |
| 106. Ricard Buxó Ramon | Sabadell (Vallès Occidental) |
| 107. Hsiu Chen Huang Li | Madrid (Hispanujo) |
| 108. Núria Inglada Cardona | Agulló (Catalunya) |
| 109. Laia Martí | Barcelona (Catalunya) |
| 110. Pol Burgues Sanuy | Ager (Catalunya) |
| 111. Emma Mateu Masvidal | Ager (Catalunya) |
| 112. Artur Cadenas Sentenach | Ager (Catalunya) |
| 113. Adrià Pitarch Rubio | Ager (Catalunya) |
| 114. Biel Fontanet Ruiz | Ametlla del Montsec (Catalunya) |
| 115. Isaac Monje Masvidal | Teià (Catalunya) |
| 116. Alex Diaz Sentenach | Àger (Catalunya) |
| 117. Fadoua Lehmiri | Àger (Catalunya) |
| 118. Halima Lehmiri | Ager (Catalunya) |
| 119. Estel Borras Barnus | Àger (Catalunya) |
| 120. Lidia Jordana Carrera | Agullo (Lleida) |

**Loka Kongresa Komitato**
Esther Inglada Cardona, prezidanto
Joan Inglada Roig

Organizas:

ESPERANTO* CAT
* Associació Catalana d'Esperanto
Kataluna Esperanto-Asocio

UNESCO
Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo

La 100ª mortodatreveno de Ludoviko Zamenhof
Solenata sub la aŭspicio de UNESKO

Instituciaj kunlaborantoj:

Ajuntament d'Àger

iei 75 anys
INSTITUT D'ESTUDIS ILERDENCS

Diputació de Lleida
municipis, territori i tu

Privataj kunlaborantoj:

ÒMNIUM
LLENGUA CULTURA PAÍS
Lleida Ponent

FENISS
FUNDACIÓN ENERGÍA E INNOVACIÓN SOSTENIBLE SIN OBSOLESCENCIA PROGRAMADA

Apogantoj:

AMPA Escola Andreu Farran

CONSELL COMARCAL DE LA NOGUERA

Fundació Arnau Mir de Tost


38a
www.esperanto.cat
KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO
SALUTON
Saluton!
Del 12-15 d'octubre de 2017 a ÀGER!!